# Dana Fervojisto 1

*ISSN: 1397-9914*

**72a jareldono** **Junio 2019**



La IFEF-estraro 2019-2022

# La DEFA-ĝeneralkunveno 2019 okazis 15/4-2019.

Denve ni renkontiĝis por la jarkunvenon ĉe Karen en Næstved. Kiel ni ofte antaŭe priskribis, ankaŭ dum la jarkunvenoj oni sentas, ke la tempo ŝanĝiĝas. Ni ne havas la fortojn kiel antaŭe, ni ne estas nombraj kiel antaxe, sed tamen ni vivas kaj aktivas, kaj ankaŭ tion respegulas niaj ĝeneralkunvenoj.

Ni povas esti kontentaj kaj fieraj pri tio, kion ni faras kadre de niaj tri membrecoj: internacie FISAIC kaj IFEF kaj nacie Jernbanefritid. Ni estas videblaj kaj aŭdeblaj, ni faras niajn devojn, kaj tion oni agnoskas.

Dum la ĝeneralkunveno okazis elektoj por la estraro - ĉiuj reelektoj.

La IFEF-kongreson en pola Vroclavo partoprenis du de nia societo, kaj DEFA preparis prelegon pri Køge Nord Stacio, sed pro tempomanko ni ne sukcesis prezenti ĝin. Tamen, tio okazis en Pardubice en februaro 2019. IFEF subskribis kontrakton kun la transportfakultato de Universitato Jan Perner, kaj la unua konkreta projekto estis prelegseminaro kun titolo 'Fervojoj en Eŭropo'. Kvin IFEF-membroj el kvar landoj prelegis, inter tiuj Jan Uldal Niemann. La ĉeĥaj IFEF-kolegoj tradukis. Tiu februara tago estis granda paŝo ka grava atingo.

'Hejme en Danio' ni celas renkontiĝi laŭ la ebloj ka fortoj ĉiun monaton. Ni informiĝas pri la okazaĵoj en la kadroj de IFEF, Jernbanefritid kaj FISAIC, kaj ni interŝanĝas spertojn kaj memorojn pri multaj aferoj, kiujn ni kune travivis, kaj pri amikoj, kun kiuj ni kune estis en- kaj eksterlande.

La protokolon kaj la ekonomian bilancraporton de la jarkunveno oni povas havi ĉe la sekretario.

DEFA

# La *Elizabeth-Line* en Londono

En 2007 la brita parlamento decidis pri tre ambicia ’ĝisdatigo’ de la fervojreto en Londono. La entrepreno *Crossrail* konstruas novan fervojon en la Londona regiono – de *Reading* kaj *Heathrow* en la okcidento per 42 km da novaj tuneloj sub Londono ĝis *Shenfield* kaj *Abbey Wood* oriente. La projekto donas dek novajn staciojn, kaj oni renovigas 30 ekzistantajn – samtepe kun integriĝo de nova kaj ekzistanta infrastrukturo. Entute oni konstruas 118 km da nova fervojlinio.
La *Crossrail*-projekto estas momente konata kiel la plej granda infrastrukturprojekto en Eŭropo.



Unu el la novaj stacioj (laŭ la planoj)

La projekto estas en multaj sencoj senkompromisa. Oni diras, kaj oni VOLAS, ke estu facile kaj komforte iri al kaj de la ĉefurbo. La navedantoj havos novajn, bonajn trajnojn (Class 345 de Bombardier), kiuj longas 200 m kaj portas 1500 pasaĝerojn. Oni havos pli da forveturoj (en la ŝvarmhoroj veturos tra la centra Londono ĉiun du kaj duonan minutojn), kaj de ĉiuj stacioj estos senbariera aliro per lifto.

Ĉiuj tiuj faktoroj – kaj la tre grava fakto, ke la vojaĝtempo en ĉiuj itineroj estos malpli longa – certe kaj sendube sekurigas, ke la re-

zulto estos, ke eĉ pli da homoj lasos la aŭton hejme kaj iros trajne.

La vojaĝtempo per trajno estos multe malpli longa ol per aŭto.

Oni antaŭvidas, ke 200 milionoj da homoj vojaĝos per la *Elizabeth Line* ĉiujare. Kaj por tiuj el vi, kiuj vizitis Londonon, kiuj provis iri per *The Tube,* kaj eble estis iom konfuzitaj – ankaŭ ĉefa parto de tiu projekto estas novaj ŝildoj, helpo-punktoj kaj klient-inform-ekranoj.




Inform-ŝildo

La konstrulaboro komenciĝis en la fabriko *Canary Wharf* en 2009 kaj estas hodiaŭ jam pli ol 80% finfarita. Unue oni inaŭguris grandan parton de la itinero decembre 2018 – de *Paddington* en centra Londono ĝis *Abbey Wood* sudoriente. Post unu jaro la okcidenta parto estos preta.

Malgraŭ la enorma projekto, kiu envolvas multajn liverantojn, multegajn subliverantojn kaj entute 19.000 laboristojn, oni antaŭvidas, ke la projekto finiĝos ĝustatempe kaj kadre de la interkonsentita financado. Estas impone, ke oni kapablas tiel stiri grandiozan projekton.

Pri la profito de la investo oni jam kalkulis. Oni supozas, ke la pli bonaj konektoj donos 55.000 novajn plentempajn laborpoziciojn kaj kontribuos al la brita ekonomio per 42 miliardoj da GBP. Kompreneble tiaj antaŭkalkuloj estas tre necertaj, sed neniu dubas, ke oni draste mallongigos la vojaĝtempon de la britoj, se oni bone kunligos la komercajn regionojn de la ĉefurbo.

Per plibonigo de vojaĝtempo, malpezigo de la trafika denso kaj oferto de pli bonaj konektoj por *Elizabeth Line* oni havos pli facilajn, pli rapidajn kaj pli rektajn vojaĝeblecojn en la tuta ĉefurba regiono.



Interno de trajno

Fonto: *SIGNAL* 2018 (revuo de la fakaj asocioj de la danaj fervojoj)

EVENTOJ
LS
INTERNACIA KALENDARO

**www.eventoj.hu**

# Estontaj DEFA-kunvenoj

Ni spertis dum la lastpasintaj jaroj, ke la kondiĉoj kaj eblecoj vere ŝanĝiĝis. Ni ne povas plani regulajn renkontiĝojn, sed devas ‘de unu kunsido al alia’ interkonsenti pri kunestoj. Kiel ni menciis antaŭe, tiu maniero donas malpli bonajn eblecon por membroj, kun kiuj ni ne havas oftan kontakton, sed estas la maniero, kiu estas la ebleco por ni.

Informojn havas ĉiam la prezidanto, kaj ĉiuj estas bonvenaj kontakti lin. Skribu al li: niemann@kabelmail.dk

Niaj aktivecoj kadre de IFEF estis dum la pasinta tempo sufiĉe ampleksaj, ĉar alproksimiĝis la 71-a kongreso en Málaga kaj la 110-jara datreveno de Esperanto-movado inter fervojistoj.

En la Faka Komisiono ankaŭ DEFA-anoj diligente kunlaboras.



# Aliaj Esperanto-aktivecoj en Danio:

## Kopenhago

***Kunvenoj de KEK*** (prezidanto: *Bent Jensenius,* tel 38 60 15 86, retadreso kek.informo1@gmail.com) okazas en *Kulturhuset, Tomsgårdsve*j 35, 2400 *Kbh NV*. Vidu ankaŭ www.esperanto.dk

## Århus

***Kontaktulo pri DEFA*:** La prezidanto.
Kunvenoj okazas kunlabore kun la Esperantoklubo de Århus en *Folkestedet, Carl Blochs Gade* 28, 1ª etaĝo, salono 7, je h 19.30, la lastan ĵaŭdon de la monato.

## Norda Jutlando:

Kunvenoj de Nordjutlanda Esperanto-Klubo (informoj: *Ejnar Hjorth*, tel. 98 13 40 40) okazas en la vintra sezono (septembro-majo) ĉiumerkrede je la 15-a horo en *Christiansgade 38, 1., Aalborg*

Nova iniciato en Berlino – dumkongresa prelego

# *Fornebubanen* – la plej granda infrastruktura projekto en Norvegio.

La projekto konstrui 8 km longan plilongigan metrolinion de *Majorstuen* al *Fornebu* en *Oslo* estas tre kompleksa. La jam densa grandurbo, montara grundo, trafluantaj riveretoj ktp. donas multajn defiojn kaj problemojn.

La projektgrupo PGF (*ProjekteringsGruppen Fornebubanen*) havas dek jarojn por projekti kaj konstrui la metrolinion.




La itinero de la nova linio

En 2017 oni komencis la projektlaboron, kaj ĝi sola daŭrus unu jaron. En la grupo estas inĝenieroj kun spertoj pri metro- kaj tunelkonstruado de Danio, Svedio, Ukrainio kaj Egiptio.

La linio kunligos la centron de *Oslo* kun la *Fornebu*-duoninsulo, kie en tiuj jaroj okazas hasta kaj granda evoluo – multaj loĝejoj kaj entreprenoj novkonstruiĝas, kaj oni volas oferti taŭgajn transporteblecojn al homoj. En *Oslo*, kiu situas en 'truo' inter montoj, oni dum laroj akcelas havi alternativon al aŭto-transporto.

Granda defio en la projekto estas ligo al la ekzistanta fervojlinio ĉe *Majorstuen* stacio. *Majorstuen* estas kruĉejo, kie oni devas konsideri la ekzistantan fervojon (*T-bane*). Estas grave, ke oni povas konstrui la novan linion, dum la ekzistanta ĉe la grava stacio plene funkcias. Ankaŭ nun oni devas jam pripensi, ke verŝajne *Majorstuen* stacion oni ligos al subtera pluretaĝa stacio por plifaciligi la trafikfluon en la centro de *Oslo*.



La centro de *Oslo* kun multaj transportiloj

Precipe por konstrui la staciojn oni renkontas teknikajn defiojn. Ekz-e ĉe la stacio *Lysaker*, kie la nova fervojlinio per tunelo kruĉiĝos kun la pli ol 7 km longa *Lysaker*-rivereto. Por fari tion oni devas ’relokigi’ la rivereton por povi fari la duonon de la tunelo sur unu flanko. Poste oni faros la samon sur la alia flanko, kaj fine oni lasos la rivereton reveni al sia origina loko. Komplika afero!

Ankaŭ pri la diversaj tipoj de grundo oni devas fari esplorojn kaj kalkulojn – ĉu roko, ĉu loza tero, ĉu argilo …

En Norvegio jam longe oni uzas la modeligan informsistemon BIM (*Building Information Modeling)*, kaj por tiu grandega projekto ĝi estas tre utila. BIM estas komplika kaj vasta programaro por

projektado de ĉiuj flankoj kaj fakoj, kaj kompreneble por grandaj projektoj kiel tiu ĉi estas taŭga (kaj profita – ĝi estas sufiĉe kosta).

En la nuna plan-paŝo oi uzas BIM por fari 3D-modelojn.




La planita finstacio *Fornebu Senter*

Fonto: *SIGNAL* 2018 (revuo de la fakaj asocioj de la danaj fervojoj)

Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

## La 71-a IFK – la triopa kongreso

Ĉ. 200 personoj kolektiĝis komence de majo en Malago, en la impona kaj bele renovigita Casa Diocesana – estas edukcentro por teologoj, sed oni ankaŭ povas lui por konferencoj. Tie okazis 'La triopa Kongreso' – la hispana, la andalucia kaj la IFEFa.




Foto: Jan U. Niemann

En tiu grandega konstrukomplekso ni ĉiuj loĝis, manĝis, kunvenis kaj ĉeestis kulturajn programojn ... nur la ekskursoj okazis kompreneble 'ekster la domo'. Ĝi situas en la periferio de Malago, sed urba aŭtobuso proksime al la domo konduis al la urba centro kaj la haveno. La plimulto aŭ partoprenis urbrigardan ekskurson aŭ iris memstare al la urbo por kelkaj horoj aŭ tuta tago.

2019 estas la 110-jariĝo de Esperanto-movado inter fervojistoj, - dum la Universala Kongreso en Barcelono 1909 fondiĝis IAEF, la antaŭulo de IFEF. Tiun naskiĝtagon IFEF dum la jaro plurmaniere celebras:

- Dum la kongreso tri kunvensalonoj portis la nomon de signifaj IFEF-anoj, kaj kiel danoj ni povas fieri, ke unu el ili estis E Henning Olsen
- Kadre de la fakprelega programero Jan Uldal Niemann prezentis bildprelegon pri la 110 jaroj
- Pli poste ĉijare IFEF eldonos Historian Suplementon 1999-2019

La fakto, ke tri kongresoj okazis samtempe, donis koloron kaj diversecon al la tuto. La solena malfermo ne estis same solena, kiel ni kutime konas ĝin ... sed tre amuza! La posta komuna foto-sesio estis kiel ĉiam!



Fotis: Guido Brandenburg

La 'kutimaj' organizaj kunvenoj okazis por ni IFEF-anoj. Dum la plenkunsido elektiĝis nova estraro por la venontaj tri jaroj (vidu la frontpaĝon). Rodica Todor, Vito Tornillo, Laurent Vignead, Ladislav Kovář kaj Jan U. Niemann gvidos nin!

La fortojn IFEF uzos en la faklabora tereno, kaj la streboj por krei projektojn kun diversaj kunaborantaj partneroj daŭras. Grava paŝo dum

2019 estis subkribo de kontrakto inter la transorta fako de Universitato Jan Perner en Pardubice (CZ) kaj IFEF kaj la unua konkreta rezulto, prelegseminario en Pardubice februare 2019 kun partopreno de kvin diverslandaj IFEF-relegantoj.

La fakaj prelegoj dum la kongreso estis multaj kaj tre diversaj, kaj kiel kutime ili aperos kiel artikoloj en la venontjara eldono de FFK. Faka ekskurso gvidis al la montara vilaĝo Ventas de Zafarraya, kie ni veturis per la eta musea trajno.



El tren del Llano en Ventas de Zafarraya. Foto: Jan U. Niemann

La kulturaj programoj estis multaj, altkvalitaj kaj variaj. Ĉiuvespere iu programo tentis nin – flamenko, kantado, muziko, teatro ... la triopa kongreso kaj ties bugeto certe influis al la multflankeco kaj kvanto de ofertoj, kaj tio donis ‘profiton’ al ni partoprenantoj de la tri kongresoj.

Kajto koncertis plurfoje – dufoje ili kontribuis per 1-1 kantoj, unu tutan vesperon kroman ili distris nin, kaj Grazia Bbarboni same – kaj ilin ver-

ŝajne vi ciuj konas. Pro tio: jen foto de la arĉa orkestro *Concerto Málaga*, kiu dorlotis nin per belega koncerto:



Estis pluraj tre interesaj ekskursoj dum la kongresa semajno, kaj post la fermo de la kongreso ĉirkau 40 personoj iris al Norda Maroko por tri tagoj.

Tie ni travivis multon dum mallonga tempo ... ni vidis kvar diversajn urbojn, kaj iliajn *Medin*'-ojn (la malnovajn urbopartojn) ni travagadis. Tie vi povas aĉeti ĈION, kaj verŝajne ni ĉiuj hejmenvenis kun iu memoraĵo.



*Chefchaouen*

Surprizo estis en la haveno de Algeciras survoje al Maroko vidi konaton:




Foto:Jan U. Niemann

*Morocco Star* estas la iama Grandbelta IC3-pramŝipo *Prins Joachim*, kiu daŭre bone vivas kaj aktivas, nun en la Mediteraneo. La kontenergruoj malantaŭ la ŝipo estas la *Mærsk*-a kontener-terminalo – do, vere dana foto!

Post enhavoriĉa, travivaĵplena kaj varma kongresvojaĝo ni ĉiuj iris hejmen, promesante al ni mem kaj al unu la alia aktivi ANKAŬ dumkongrese … ni revidos ĉe la pol-germana landlimo en Słubice – Frankfurt/Oder, fine de majo venontjare!

**Transponta Esperanto-Kongreso**
**germana - pola - fervojista**

**TRAKO**

**Frankfurt (O) / Słubice**
**29-a de Majo – 5-a de Junio 2020**

J&L

**Dana Fervojisto estas organo de Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA)**

Prezidanto:
Jan U. Niemann
Hovedvagtsstræde 9 E, 1
DK-3000 Helsingør
tel 71 70 63 83
aŭ 71 72 32 42
niemann@kabelmail.dk

Kasisto: Karen K. Olsen
Manøvej 6
DK-4700 Næstved
tel 55 72 73 77
bankkonto (Lån&Spar)
0400 107 10 07539

Redaktantoj: Jan kaj Lene Niemann
Vidu adreson supre.

Preso: HVS9E1

Redaktofino por venonta numero de Dana Fervojisto:

1/11-2019

## Enhavo:


| | |
|---|---|
| paĝo 2 | DEFA ĝeneralkunveno |
| paĝoj 3-5 | La *Elizabeth-Line* en Londono |
| paĝoj 6-7 | Aktivecoj |
| paĝoj 8-10 | *Fornebubanen* |
| paĝoj 11-15 | La 71-a IFK |


## La universala kongreso okazos ĉijare en Finnlando ...

La 104a UK okazos de la 20-a ĝis la 27-a de julio. Grava evento de la jaro … serĉu IFEF-on ĉe la Movada Foiro kaj ĉe la fervojista kontakt-kunveno.